

Gazeto



Andaluzia

Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro

37-a Jarkolekto - Junio 2023 - N-ro 129

Zuheros

(Kordovo)



Aprilo / Junio 2023
Enhavo

- P. 03 Esperanto en Andaluzio.**
P. 07 Pepita de Oliva, influa virino en Eŭropo.
P. 09 Lingva Angulo:
El kondicional -US-
P. 13 Poezia Angulo.
P. 14 Nuntempa Vortaro:
Andaluzia Sankta Semajno - Pasko.
P. 17 Folioj por Praktikado.
P. 20 Turismi en ...
Zuheros (Kordovo).
P.24 Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio: 1910, Felix Moscheles prelegas en Granado.
P. 26 $E=mc^2$ Scienca Angulo:
Komputilo kontraŭ homo en ŝakluda turniro.
P. 29 Flamenko:
El Beni de Cádiz.
P. 31 Fervojista angulo:
Relo-busoj en Andaluzio.
P. 33 Komikso: La Fosilio.
P. 39 Nun Ni. Junularaj Paĝoj.
P. 41 Andaluzia kuirarto:
Paŝtista ajlo.
P. 43 Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio: La Rifo de la Sirenoj en Almerio.
P. 45 Vorto-ludoj.

Gazeto Andaluzia

Fundada por D. José Garzón Ruiz, en San Fernando (Cádiz) en 1910. Órgano oficial de la Asociación Andaluza de Esperanto.

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto
REDACCIÓN: C/ Ánfora 6 5-D
29013 Málaga (Hispanio)
DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86.
ISSN: 1576-0618.

DIRECTOR: Ángel Arquillos López
REDACTORES:
José María Rodríguez Hernández
Alejandro Burgos Escalante



Sur la kovrilo:
Ĝenerala vidaĝo de Zuheros (Kordovo)

ESPERANTO EN ANDALUZIO

ESPERANTO EN LA GIMNAZIO "MARQUÉS DE COMARES" EN LUCENA

Kiel dirite sur la pasinta numero de nia revuo, profesoro Juan Diego Díaz organizas kurson de esperanto en la gimnazio Marqués de Comares en Lucena (Kordovo). La eniro de la internacia lingvo en ĉi tiun stud-centron ne nur okazis pere de kurso kaj prelego, sed ankaŭ dank'al la nomigo de la klasĉambroj, kiuj nuntempe sciigas sian funkcion per la hispana, la angla, la franca kaj la esperanta lingvoj.

Apude videblas la klasĉambro D15, kiu utilas kiel *Komputika Klasĉambro*.



ZAMENHOFA TAGO EN SEVILO

Kiel kutime, Sevila Esperanto-Asocio aranĝis meze de la monato decembro la tradician manĝo-kunvenon de la Zamenhofa Tago. Ĉi tiu tradicio devenas de la 1920-aj jaroj, tiam diversaj aktivuloj kaj intelektuloj de la esperanto-movado en Eŭropo elektis la 15-an de decembro kiel Esperanto-Festotagon, ankaŭ nomita Tago de la Esperanto-Kulturo kaj Tago de la Esperanto-Libro. Ĉi-jare en Sevilo renkontiĝis dekkvino da esperantistoj ĉe restoracio.



Membroj kaj simpatiantoj de Sevila Esperanto-Asocio la pasintan 17-an de decembro 2023 okaze de la Zamenhofa Tago

MENCIO DE ESPERANTO EN LIBRO PRI BLAS INFANTE

La Fondaĵo Blas Infante kaj la Departamento pri Kulturo de la Andaluzia Registaro ĵus eldonis la libron *Don Dimas. Historia de Zorros y de Hombres* (Sinjoro Dimas. Historio de Lupoj kaj de Homoj), kies aŭtoro estis Blas Infante Pérez (1885-1936). Temas pri teksto verkita de la Patro de la Andaluzia Patrujo en la jaro 1927, kaj neniam publikigita ĝis nun. Verdire oni ne scias kial ĉi tiu teksto, kiu estas unu el la plej ŝatataj de Blas Infante, neniam estis publikigita. La temo de la libro rakontas la historion de la *Sinjoro Dimas*, perdita lupeto kiu estis akceptata ĉe la hejmo de Blas Infante.

La prologo de la libro estas verkita de Manuel Hijano del Río. La verko ankaŭ enhavas studon de Norberto Ruiz Rodríguez kaj Manuel Ruiz Romero, ĉiuj ili estas fakuloj pri la verkaro kaj



vivo de Blas Infante. Ene de la libro oni mencias diversloke la studojn pri la esperantisteco de la Patro de la Andaluzia Patrujo, konkrete oni parolas pri la prelego de Juan de Dios Montoto pri "*Esperantismo en Blas Infante*", kiu okazis dum la Andaluzia Kongreso de Esperanto de Jerezo en la jaro 1988 kaj pri la eseo prezentita en la jaro 2022 kun la titolo "*Y la Humanidad... Blas Infante y el Esperanto*", fare de Juan de Dios Montoto kaj José María Rodríguez.

KREDO DE LEGOGRUPO EN GRANADO

Esperanto-Klubo de Granado ne multe aktivis dum la lastaj jaroj, precipe pro la kronviruso. Nun, estas planite krei legogrupon. La celo de ĉi tiu rondo estas renkontiĝi la lastan dimanĉon de la monato por preparoli verkaĵon, t.e. ni legos po libron monate. La libroj nepre estas originale verkitaj en esperanto kaj laŭleĝe elŝuteblaj el la reto. Ĉiuj interesitoj devas plenigi jenan demandaron por elekti la unuan libron, kiun ni legos dum la monato aprilo:

<https://forms.gle/aPLD5u9q1EA1NaUn8>

Same, oni petas al eblaj interesitoj konfirmi aliĝon al la legogrupa pere de retroŝtmesaĝo al jena retadreso: granada@esperanto.ac

La libroj nepre estas originale verkitaj en esperanto kaj laŭleĝe elŝuteblaj el la reto. La Esperanto-Klubo de Granado provizos vin per la libro. Eblas al vi ĉiuj sugesti verkon. Ni renkontiĝos la lastan dimanĉon de la monato aprilo, t.e. la 28-an.

Kiun libron ni devas legi en la monato aprilo?

*

- Raymond Schwartz - La stranga butikoj (POEZIO)*
- Heynrich A. Luyken – Pro Iŝtar (ROMANO)*
- A. de Hoog – Du malsanoj en Esperanto (ESPERANTOLOGIO)*
- Stellan Engholm - Vivo vokas (ROMANO)*
- Alia:*

ALIĜU AL Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Post solvi kelkajn problemojn kun la banko, nia asocio reaktivis la konton kiun ni aranĝis por ricevi jarajn aliĝojn.

La ekzisto de ĉiuj asocioj, ankaŭ de AEU, dependas ĉefe de la kunlaborado de la membroj, pro tio ni invitas al vi pagi la kotizon por la jaro 2024.

La jara kotizo estas 20 € kiun vi povas pagi ĉe:
Caixabank IBAN ES74 2100 7234 6713 0048 0698
Asociación Andaluza de Esperanto



HAZTE SOCIO DE LA Asociación Andaluza de Esperanto

Después de algunos problemas con el banco, nuestra asociación vuelve a activar la cuenta que mantenemos para el cobro de cuotas.

La vida de cualquier asociación, también la nuestra, depende principalmente de la colaboración de sus socios, por eso te invitamos a que abones la cuota correspondiente al año 2024.

La cuota anual es de 20 € que puedes ingresar en
Caixabank IBAN ES74 2100 7234 6713 0048 0698
Asociación Andaluza de Esperanto

EL OLE.
Spanischer Nationaltanz
SENORA

Pepita de Oliva *influa virino en Eŭropo*

Josefa Durán Ortega naskiĝis en Malago, kvartalo Perchel, en la jaro 1830. Ŝi estis filino de tre humila paro, la patro Pedro Durán estis barbiro kaj la patrino, Catalina, estis ciganino kiu vendis surstrate uzitajn vestaĵojn. Sed, laŭdire, la vera patro estis duko kiu ne agnoskis leĝe sian idon.

Baldaŭ, la familio translokiĝis en Madridon, tie ekzistis pli bonaj vivkondiĉoj. Infan-aĝe Josefa, konata kiel Pepita, montris sian kapablon danci, do ŝi provis trapasi ekzamenon por eniri en la dancan trupon de la Teatro de l' Princo en Madrido, tamen ties direktoro ne trovis sufiĉajn artajn kvalitojn en Pepita kiel dancistino.

Male, alia direktoro, tiu de la Hispana Teatro de Madrido, atentis pri tiu juna ciganino kiu dancis gracie danco-stilon konata kiel "*kaĉuĉo*".

Do, li petis al alia dancisto, Juan Antonio Gabriel de la Oliva, de la teatra trupo instrui al ŝi ĉion necesan por fariĝi lerta dancistino. La arta rilato finiĝis en geedzo, okazinta en la jaro 1851. Bedaŭrinde la paro ne vivis kune dum multe da tempo, tiel, kelkaj monatoj post la nupto ili decidis fini sian amrilaton.



Litografio de Pepita de Oliva fare de la brita G. Bartsch en la jaro 1855

El tiu ne-daŭra geedzo Pepita atingis novan artan nomon, tiel ŝi estis konata en la hispanaj scenejoj kiel *Pepita de Oliva*. Dum la 1850-aj jaroj ŝi komencis sian karieron ĉe la plej gravaj scenejoj en kelkaj eŭropaj teatroj, unue en Bordoza (Francio), poste en Berlino, Lepsiko, Kopenhago, Londono... Ĉefe ŝi estis tre konata en la scenejoj de la Aŭstrio-Hungara Imperio, ekzemple, en la jaro 1856 ŝi ludis la plej gravan rolon en la opero "*La mutulino de Portici*" de Daniel François Esprit Auber.




Pepita Oliva en la jaro 1856

Eĉ Johan Strauss filo dediĉis al ŝi sian polkon "*Pepita*" en la jaro 1853. Ŝi fariĝis tiel konata en la tuta centr-eŭropo, ke per ŝia nomo estis konata blank-nigran tekstilaĵon, kiun ŝi ofte uzis, temis pri etaj blank-nigras tekstilaj desegnaĵetoj, konataj en la germana lingvo kiel "*Pepita*" aŭ en la pola kiel "*Pepitka*".

En Germanio ŝi ekrlatis kun brita nobelo kaj diplomato, Lionel Sackville-West, sekretario de la brita ambasadejo en Berlino. Li havis edzinon, tamen li aĉetis al Pepita vilaon en la urbo Arcachon (Francio), tie ili loĝis kaj tie naskiĝis kvin filoj. En Arcachon mortis dum akuŝado Pepita Oliva en la jaro 1872.

Unu el ŝiaj nepinoj, la brita verkistino Vita Sackville-West verkis libron pri sia avino en la jaro 1937. Sur la libro, la brita poetino parolas pri la izolita kaj sekreta vivo de sia avo en Francio, ĉar la puritana brita socio ne akceptis la rilaton inter elstara brita nobelo kaj andaluzia dancistino.

Tipa blank-nigra kvadratita motivo sur vestaĵoj, kiu ricevis la nomon de la andaluzia dancistino en diversaj lingvoj: *Pepita* en la germana kaj *Pepitka* en la pola kaj en la ĉeĥa lingvoj.





Cuando estudiamos las terminaciones de los verbos en esperanto vemos que el condicional se forma con el final -US-. Sin embargo, esta forma condicional en esperanto expresa una idea más amplia que a la que se refiere el condicional en español, en tanto que podemos decir que la terminación -US- expresa cualquier acción o estado irreal, imaginario, deseable o propio de la fantasía. Y esto, en español, a veces se expresa con el subjuntivo, no con el condicional. Así, en esperanto el tiempo verbal que indica una acción que consideramos imaginaria, ideal o deseable la expresamos con -US-.

Veamos algunos ejemplos:


- *Se mi estus riĉa, mi aĉetus grandan domon kaj poste, mi donacus ĝin al vi.*
Si yo fuera rico, me compraría una gran casa y después, te la regalaría.

En español, en esta frase hemos mezclado un subjuntivo "fuera" con dos condicionales "compraría" y "regalaría", sin embargo, en esperanto hemos utilizado en todo momento el condicional -US-, porque estamos hablando de acciones irreales, imaginarias o deseables.

Con el condicional -US- en esperanto se expresa una acción que consideramos imaginaria, ideal, deseable o propia de la fantasía.

Veamos algunos ejemplos más:

- *Se vi parolus la internacian lingvon, vi povus viziti la tutan mondon.*
Si tú hablaras la lengua internacional podrías visitar todo el mundo.
- *Se mi sciis kiel iri en vian domon, mi vizitus vin ofte.*
Si yo supiera cómo ir a tu casa te visitaría a menudo.



La fama usona filmo "Violonisto sur tegmento" (1971)
havas tre belan filmo-muzikon kun tre bela kaj konata
kantaĵo "If I were a rich man"
(*Se mi estus riĉa*)

Usando la preposición SE podemos afinar incluso un poco más lo que queremos decir, así:

Si usamos SE + condicional, estaremos diciendo que se produciría un hecho si se cumpliera la condición, sin embargo es poco probable o real que eso llegue a ocurrir:

- *Se vi vizitus mian patrinon, vi povus donaci al ŝi bukedon da floroj.*
Si visitaras a mi madre podrías regalarle un ramo de flores.

SE + condicional -US- es poco probable que ocurra.

Sin embargo, si usamos el condicional SE + verbo en presente, estamos diciendo que eso es muy probable que ocurra.

- *Se vi vizitas mian patrinon, vi povas donaci al ŝi bukedon da floroj.*
Si visitas a mi madre puedes regalarle un ramo de flores
Cuando visites a mi madre puedes regalarle un ramo de flores.

SE + presente -AS- es muy probable que eso ocurra.

Otro ejemplo:

- *Se vi konus mian amikon, vi tutcerte ŝatus lin.*
Si conocieras a mi amigo seguro que él te gustaría.
- *Se vi konas mian amikon, vi tutcerte ŝatas lin.*
Si conoces a mi amigo seguro que te gusta.

**Al igual que en español, el uso del condicional -US-
hace más amable una petición.**

El uso del condicional -US- también se emplea, como ocurre en español, para expresar una orden o una petición con mucha cortesía, casi con delicadeza.

Así, no es lo mismo decir:

- | | | |
|---------------------------------|-----|---|
| • <i>Silentu!</i>
¡Silencio! | que | • <i>Ĉu vi povus silenti?</i>
¿Podría estar en silencio? |
|---------------------------------|-----|---|

Igualmente:

- | | | |
|---|-----|--|
| • <i>Mi deziras aĉeti libron</i>
Yo deseo comprar un libro | que | • <i>Mi dezirus aĉeti libron.</i>
Yo desearía comprar un libro. |
|---|-----|--|

Es verdad que en ambas frases estamos manifestando un deseo de comprar un libro, sin embargo el uso del condicional -US- lo expresa de una manera mucho más suave o diplomática.

Veamos algunas frases más con el condicional -US.:

- *Mi vojaĝus tra la tuta mondo, se mi disponus pri sufiĉaj feriaj tagoj.*
Yo viajaría por todo el mundo si dispusiera de suficientes días de vacaciones.
- *Kiam vi kapablus esti prudenta mi povus rakonti al vi sekreton.*
Cuando fueras capaz de ser prudente te podría contar un secreto.
- *Se mi havus rapidan aŭtomobilon, mi povus iri en la laborejon akurate.*
Si yo tuviera un automóvil rápido podría ir al trabajo puntualmente.
- *Ĉu vi estus tiel afabla pruntedoni al mi vian krajonon?*
¿Sería tan amable de prestarme su lápiz?

Para preguntar con cortesía:
Ĉu vi estus tiel afabla....? ¿Sería tan amable de...?



Mi estas
poligloto



Mi havas nivelon **C1**
en la angla...



nivelon **C2**
en la franca....



kaj nivelon **Ĉ**
en esperanto !

Moaksaĥo de Al-shustari

Jen la lum' de l' bona vojo
brilis por mi en la koro.

Ŝprucis suno el konceptoj,
kaj la lum' el perfekteco,
vibris en mi kiel vero
kun intenso kaj fervoro.

Jen la lum' de l' bona vojo
brilis por mi en la koro.

Mi aspiras l' Amatinon.
Li dorlotis min plej plaĉa,
metis min survoje ama
laŭ mia sentiva volo.

Jen la lum' de l' bona vojo
brilis por mi en la koro.



Abu-I-Hasan Ali b. Abd Allah
al-Nuymari, al-Shushtari,
1212 - 1269

Al-shustari naskiĝis en la vilaĝeto Sustar, apud la granada urbo Guadiks'. Kvankam li naskiĝis kaj loĝis dum multaj jaroj en Al-andaluso, ĉi tiu islama mistikulo enmigris en Orienton. Li estas konata aŭtoro, ĉefe pro siaj moaksaĥoj, klera poemo kun popollingva rekantaĵo kiu havis pintan epokon en Al-Andaluso inter la 9-a kaj la 12-a jarcentoj. Li forpasis en Egiptio.

Andaluzia Sankta Semajno - Pasko



Kunfrataro

Religia asocio, grupo aŭ ordeno al kiu apartenas homoj, honore al religia figuro. Ofte temas pri du religiaj figuroj, unu dediĉita al Jesuo-Kristo kaj la alia al Virgulino Maria.



Pento-faranto

Partoprenanto en procesio, normale oni kaŝas sian identecon, pro la fakto ke oni partoprenas en la marŝado por pentigi.



Procesio

Ceremonia religia marŝado de klerikaro, pento-farantoj kaj muzik-bando, akompanantaj religiajn figurojn.



Kap-sako kaj Tuniko

Vesto el teksaĵo utila por ne montri kapon kaj vizaĝon (kap-sako) kaj por kovri la korpon (tuniko). Ofte oni uzas ankaŭ mantelon. La koloroj de la vestaĵoj distingas unu kunfrataron de aliaj.



Kandelo

Ofte portita de
ĉiu pento-faranto.



Procesiokruco

Kruco solene portita de estro
de la kunfrataro, kiu situas en
la komenco de la procesio.



Muzik-bando

Grupo de muzikistoj, normale
trumpetoj kaj tamburoj, kiuj
akompanas la procesion.



Lignotrono

Platformo el ligno kie oni starigas religiajn figurojn.
Normale, sur ili aperas figuroj rilataj al la vivo de Jesuo-
Kristo kaj aliaj dediĉitaj al la Virgulino Maria.



Laborestro

Homo situanta antaŭ la lignotrono,
kiu direktas kaj ordonas la laborojn
de la portantoj



Frapilo

Arta objekto, normale el arĝento, troviĝanta
sur la antaŭa parto de la lignotrono, pere
de kiu la laborestro sciigas al portantoj la
momenton kiam oni devas levi aŭ mallevi la
lignotronon.



Ŝarĝo-portantoj

Grupo de homoj portantaj la lignotronon. Laŭ la maniero porti ĝin, ili povas troviĝi ĉu sub la lignotrono, ĉu en ties antaŭa kaj malantaŭa parto.



Baldakeno, kovrila tapeto formanta tegmenton super la religia figuro.

Vergoj, longaj maldikaj stangoj, kies funkcio estas subteni baldakenon.

Kandelaro, aro da kandeloj ornamantaj la lignotronon.



Eklevo

Subita kaj rapida levo de la lignotrono fare de la ŝarĝo-portantoj, post ordono de la laborestro.



Saeto

Religia koplo, kantita ĉe balkono honore al religia figuro dum procesio. Ĝi estas konsiderata kiel flamenka kantaĵo.



Folioj por praktikado

INSULO DE LA ROZOJ

En la jaro 1968 la homoj **komencis paroli** pri novaj ideoj, povo de la popolo, libereco por ĉiuj. Giorgio Rosa, itala inĝeniero, konstruis sian **liberan ejon** sur artefarita insulo en la Adriatika Maro, **12 kilometrojn for de** la itala marbordo, kaj **500 metrojn ekster** la itala teritoria limo. Tiu teritorio ricevis la nomon Esperantistan Respublikon de la Insulo de la Rozoj. Rozo estas ankaŭ la familia nomo de la konstruisto, **tradukita el la itala**.

Por montri ke la Insulo havas internacian celon, la lingvo de la malgranda (nur 400 kvadratajn metrojn longa) nacio estis Esperanto. La insula registaro presigis poŝmarkojn en Esperanto. Neniu loĝis sur la insulo, sed okazis sur ĝi multaj dancofestoj, kaj multaj homoj **vojaĝis al ĝi el la itala marbordo** per malgrandaj ŝipoj. La insulo estis tre fama inter la turistoj.

Malgraŭ la fakto ke la insulo estis ekster la italaj landlimoj, la itala registaro timis, ke la komercaj agadoj okazantaj sur la insulo ne pagos impostojn al la ŝtato. Tial la polico esploris, ĉar italoj devas respekti la naciajn leĝojn **eĉ se ili estas en eksterlando; farante tion**, tamen, la itala registaro montris, ke ĝi konsideras la Insulon aparta "ŝtato". Sekvis mallonga jura batalo, kiun la Insulo malgajnis: la 11-an de februaro 1969 la polico **malkonstruis** la insulon.

> komencis paroli

Aunque en esperanto existe el prefijo *ek* que expresa la idea de "comenzar a...", también podemos decir *komenci* + infinitivo. No es necesario añadir la preposición "a", que sí se utilizaría en español al decir "comenzar a + infinitivo".

komenci paroli: comenzar a hablar. / *ekparoli*.

komenci labori: comenzar a trabajar / *eklabori*.

> **liberan ejon**

Recuerda que en esperanto los prefijos y los sufijos se pueden convertir en palabras por sí mismas, tan solo con añadirles la terminación correspondiente ("o" para sustantivo, "a" para adjetivo, "e" para adverbio, etc). Así podemos convertir en sustantivo el sufijo "ej" que significa "lugar adecuado para...", tan solo añadiéndole la terminación "o". De este modo "ejo" significaría "lugar". Y *libera ejo* sería un lugar libre. Veamos algunos ejemplos más hechos a partir de sufijos y prefijos:

Mal: prefijo que indica lo contrario de... *Male*: contrariamente.

Il: sufijo que indica instrumento para... *Ilo*: herramienta, instrumento.

Ar: sufijo que indica reunión de varios elementos. *Aro*: conjunto, grupo.

> **12 kilometrojn for de**

Literalmente significa "12 kilómetros lejos de...". Las magnitudes se indican con acusativo, así:

La konstruaĵo mezuras 100 kvadratajn metrojn.

La construcción mide 100 metros cuadrados.

> **500 metrojn ekster**

La traducción podría ser "500 metros fuera de / en el exterior de". Mientras que *for* es un adverbio que indica lejanía (*for, fore de* = lejos de), *ekster* indica que algo se encuentra en el exterior de una zona concreta, no necesariamente indica que se encuentra lejos. Veamos más usos de *ekster*:

Oni ne povas trinki bieron ekster la trinkejo.

No se puede beber cerveza fuera del bar.

Morgaŭ ne pluvos, do ni povos manĝi ekster la domo.

Mañana no lloverá, así que podremos comer fuera (en el exterior) de la casa.

> **tradukita el la itala.**

Recuerda que la preposición "el" nos habla del lugar de donde proviene algo, de donde algo se ha extraído. Así, "tradukita el la itala" significaría "traducido del italiano". Un pequeño truco para comprender la preposición "el" es imaginar una biblioteca de la que se saca un libro, por eso no diríamos:

> vojaĝis al ĝi el la itala marbordo.

De nuevo aparece la preposición "el" indicando origen, extracción. Con "al" indicamos una dirección "al insulo de la rozoj" (a la isla de las rosas), y con "el" el origen del viaje "el la itala marbordo" (de la costa italiana).

> Malgraŭ la fakto ke

Es una buena construcción para aprenderla de memoria y utilizarla de vez en cuando. Significa "a pesar de que / a pesar del hecho de que". Veamos algunos ejemplos:

Malgraŭ la fakto ke morgaŭ pluvos, ni manĝos ekster la domo.

A pesar del hecho de que mañana lloverá, comeremos fuera de la casa.

Hodiaŭ varmegas, malgraŭ la fakto ke ni estas en vitro.

Hoy hace muchísimo calor, a pesar de que estamos en invierno.

> eĉ se ili estas en eksterlando.

Literalmente lo traducimos como "incluso si ellos están en el extranjero". La construcción "eĉ se..." (incluso si, hasta si) es muy interesante, veamos algunos ejemplos:

Ili gajnas malmulte da mono, eĉ se ili laboras dum la tuta tago.

Ello ganan poco dinero, incluso si trabajan durante todo el día.

Mi ĉiam estas laca, eĉ se mi dormas dum multaj horoj.

Yo siempre estoy cansado, incluso si duermo durante muchas horas.

> farante tion.

La traducción literal sería "haciendo eso". "Farante" es el participio de presente del verbo "fari" (hacer). Veamos más ejemplos de esta forma verbal:

Studante dum la tuta vespero vi sukcesos en la ekzameno.

Estudiando durante toda la tarde, aprobarás el examen.

La tempo pasas malrapide atendante bonajn informojn.

El tiempo pasa lentamente esperando buenas noticias.

> Malkonstrui

Quizá el prefijo "mal" sea el más conocido de todos, nos sirve para indicar lo contrario de lo que expresa el verbo "malkonstrui" sería "destruir", es decir "lo contrario de construir".



Zuheros (prononcu: *Zueros*) estas unu el la plej belaj vilaĝoj en la kordova provinco. Ĝi troviĝas ene de la Natura Parko de la Subbetika Siero, kun kruta reliefo, oliv-arbaroj kaj verdaj kverkoj kaj mallonga rivero. La vilaĝo troviĝas piede de monto, kun impona kastelo kaj malaltaj domoj blankaj kaj kun fasadoj ornamitaj per floroj.

Verŝajne Zuheros estas la araba vilaĝo *Sujajrat Hims*, fondita en la 9-a

jarcento de la islama tribo *Banu Himsi*. Ili konstruis malgrandan kastelon, kiu estis konkerita en la jaro 1240 de la kastiliaj trupoj. En tiu jaro, vilaĝo kun la nomo *Cuheros* aŭ *Zuheros* estas menciata en dokumentoj.

Konkerantoj plibonigis la kastelon, pro la fakto, ke la zono troviĝis tuj apud la landlimo kun la granada islama regnolando. Oni konstruis ankaŭ preĝejon kaj muregon. Kiam en la jaro 1492 finiĝis la milito inter Kastilio kaj Granado, la zono ĉirkaŭ Zuheros paciĝis, do, novaj konstruaĵoj preterpasis la muregon. Ankaŭ stariĝis nova preĝejo kaj la kastelo ĉesis siajn militajn funkciojn kaj ĝi fariĝis rezidejo de nobela familio. En la jaro 1755, la Lisbona Tertremo multe damaĝis la vilaĝon, kies kastelo preskaŭ komplete detruigis.



Blazono de Zuheros

En la jaro 1938 komenciĝis serioza esploro de la Groto de la Vespertoj, en tiu jaro armeaj oficiroj esploris la lokon, kie oni eltrovis surrokajn pentraĵojn. La arkeologiaj studoj daŭriĝis kaj komence de la jaro 2002 la groton oni malfermis al ĝenerala publiko. De tiam la Groto de la Vespertoj estas la plej grava turisma

alogaĵo de Zuheros. Nuntempe ĝi estas malgranda vilaĝo kun preskaŭ 700 enloĝantoj, kies ekonomiaj

rimedoj estas la olivarbaro kaj de antaŭ kelkaj jardekoj ankaŭ la rura turismo.



Kastelo de Zuheros, preskaŭ detruita en la jaro 1755 fare de la Lisbona Tertremo

Monumentoj

• Groto de la Vespertoj

Eltrovita meze de la 19-a jarcento la ek esploro komenciĝis dum la 20-a jarcento, la groto de la vespertoj hodiaŭ estas la ĉefa turisma vidindaĵo de Zuheros. Ĝis nun ekzistas detalita mapo kun pli ol 3 kilometroj, tamen la esplorado daŭriĝas, hodiaŭ estas eble turisme viziti preskaŭ 500 metrojn en la groto. Dum la vizito estas necese malsupreniri 65 metrojn pere de 700 ŝtupoj.

Dum la arkeologiaj esploroj oni trovis homan skeleton, post studoj oni asertas, ke li vivis antaŭ 7245 jaroj.



Kastelo de Zuheros

Konstruita rekte sur la rokoj de la montaro dum la 9-a jarcento fare de la araboj, post la kastilia konkero fariĝis renesenca palaco. Ĝi estas preskaŭ tute detruita post la Lisbona Tertremo mezde de la 18-a jarcento.

El tie estas eble vidi vastan areon de la kordova kamparo kaj de la montoj ĉirkaŭantaj la vilaĝon.

• Ĉirkaŭanta siero.

Zuheros havas unu el la plej allogaj zonoj por pad-marŝadi. Ĝi trakuras la Naturan Parkon de la Subbetika Siero kaj la rivero *Bailón*.

Festoj

Dum la tuta monato decembro, ĝis la epifania festo la 6-an de januaro, grupoj de homoj marŝas tra la stratoj kantante kaj ludante *carrizos*, muzik-instrumentoj similaj al zambomboj.

Meze de la monato aŭgusto okazas tipa andaluzia kermeso, honore al la Virgulino de la *Remedios*. Ĝi okazas tuj apud la kastelo.



Vojo tra la rivero *Bailón* en Zuheros

Gastronomio

Zuheros estas ankaŭ konata pro la Festo de l' Fromaĝo, kiu okazas ĉiujn jarojn. Rilate manĝadojn, bongustaj estas la *sobrehusa* (kuirajo de faboj kun malmole kuirita ovo); ankaŭ la *cachorreña* (sekigita moruo kun oranĝo, ovo, pano kaj tomato). Pri desertoj, nepre gustuminda estas la fromaĝo kun mielo kaj sukero.



Venontnumere Turismi en ...
NIEBLA (Onubo)



**Esperanto,
ponto inter popoloj**



Ponto super la rivero Gvadalkiviro en Palma del Río (Kordovo)
Inaŭgurita en la jaro 2008



Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio.

1910, Felix Moscheles prelegas en Granado

Kvankam ne tro bone pristudita, la disvastigo de la internacia lingvo en la urbo Granado komenciĝis jam en la jaro 1904, kiam la poŝt-funkciulo José Barbero Garrido diskonigis la aranĝadon de kurso de esperanto, kadre de la ĵus naskinta "Academia de Esperanto de Granada", ĉe la strato Piedras Santas. Verdire, S-ro Barbero profitis stud-centron al li apartenanta por enirigi kurson de esperanto, kune kun aliaj por sukcesi en la ekzamenoj al poŝtaj postenoj.

La plej grava akto kun esperantista eĥo en Granado okazis en la monato februaro de 1910. Tiam, S-ro Felix Moscheles prelegis en salono de la granada Liceo pri la temo "Lastaj antaŭaj paŝoj de la pacisma movado". S-ro Moscheles estis prezidanto de la Internacia Arbitracia kaj Paca Asocio, organizaĵo fondita en Londono en la jaro 1880, kun la celo eviti milit-konfliktojn pere de arbitraciaj solvoj al internaciaj problemoj. La prelego estis organizita de la Franc-Hispana Kultura Societo de Granado.



Felix Stone Moscheles
1833 - 1917

Moschles, okaze de la prelego, pardonpentis pro la fakto, ke li ne prelegis en la hispana lingvo. Verdire ĝi okazis en la franca lingvo, do li profitis por sciigi al la publiko pri la taŭgeco de la internacia lingvo esperanto por la homa komunidado, estas necese diri, ke en tiuj jaroj la zamenhofa lingvo apenaŭ estis 20-jaraĝa.

Felix Moschles estis verkisto kaj esperantisto, li apartenis al la Lingva

Komitato, grupo de lingvaj kompetentuloj kreita antaŭ ol la Akademio de Esperanto. Krome, li estis la unua prezidanto de la Londona Esperanto-Klubo kaj vicprezidanto de la Brita Esperanto-Asocio.

Felix Moscheles estis senlaca propagandisto de la lingvo ĉe la pacisma movado, tiel, li proponis al Brita Paca Kongreso, okazinta en la urbo Leeds en la jaro 1913, adopti la internacian lingvon esperanton kiel oficialan lingvon de la pacaj kongresoj, ĉar la internacia lingvo alportis dezirojn por paca solvo al la internaciaj konfliktoj. La propono estis unuanime akceptita.

Alia esperantisto informis sur granada ĵurnalo pri la okazigo de la prelego, temis pri Aureliano del Castillo, respondeculo de la universitata biblioteko kaj redaktoro de la ĵurnalo El Defensor de Granada. Kompreneble, del Castillo sciigis pri la esperantisteco de S-ro Moscheles kaj pri la taŭgeco de la internacia lingvo en la pacisma movado.

La laboroj de Felix Moscheles kaj lia pacisma asocio bedaŭrinde ne sukcesis, kelkajn jarojn post tiu prelego, en 1914, komenciĝis en Eŭropo kruela milito. Felix Moscheles forpasis en la jaro 1917, kiam la milito fariĝis pli intensa.

Lingva Komitato de Esperanto en la jaro 1907. Meze, D-ro Zamenhof.
Sub la litero M aperas Felix Stone Moscheles.





$E = mc^2$ *Scienca Angulo*

Komputilo kontraŭ homo en ŝakluda turniro.

Sciante, ke ŝako estas ludo kun matematika bazo, nuntempe ĝi estas uzata por klarigi la utilon de kelkaj matematikaj formuloj kaj algoritmoj. Tio okazas pro la fakto, ke en ŝakludo partoprenas limigita nombro da pecoj, kiuj moviĝas sur difinitaj kvadratoj kaj la ludo mem havas ekzaktan kaj klaran regularon.

Jam dum la 1950aj jaroj, oni asertis, ke iam komputiloj povus venki homon dum ŝak-matĉo, eĉ se la ludanto estus monda ĉampiono. Do, la tiama defio de informadikistoj kaj matematikistoj estis: *"Ni konstruu komputilon kapablan venki la plej lertan ŝakludiston"*.

En la jaro 1985, Universitato Carnegie Mellon en Pensilvanio (Usono), eklaboris en la projekto *ChipTest*, kiu poste evoluis ĝis la pli efika programo *Deep Thought*. Laŭ opinioj de ties kreantoj, ĉi tiu softvaro jam estus kapabla ludi kontraŭ mond-ĉampiono. Do, okazis matĉo, sed la tiama ĉampiono Gary Kasparov facile venkis dufoje al programo *Deep Thought*.



En la jaro 1989, la usona informadika entrepreno IBM interesiĝis pri la afero. Tiam, ĝi aĉetis la softvaron de *Deep Thought* kaj oni elaboris novan programon, sub la nomo *Deep Blue*. La nomo baziĝas sur la originala softvaro *Deep Thought* kaj la kromnomo de IBM-kompanio, kiu ankaŭ estas konata kiel *Big Blue*.

La ĉefa celo de la kreantoj de *Deep Blue* ne estis nur venki homon aŭ eĉ mondan ŝak-ĉampionon, sed specife atingi venkon kontraŭ Gary Kasparov, tiam konsiderata kiel la plej bona ŝakludisto en la homo.

Deep Blue estis superkomputilo kun 30 procesoroj IBM Power 2 de 120 megahercoj, kaj aliaj 480 malgrandaj procesoroj. La komputilo estis kapabla kalkuli 100 milionojn da movoj en unu sekundo, laŭ la unua versio de la softvaro. Alia karakterizaĵo de la komputilo estis, ke ĝi povus lerni novajn kombinojn kaj strategiojn post ĉiu movo.

Tiel, nova defio okazis inter la 3a kaj la 11a de majo 1997, denove kontraŭ la rusa mond-ĉampiono Gary Kasparov. La rezulto de la turniro ĉi-foje ne estis simila al tiu unua. *Deep Blue* venkis en du el la matĉoj, en unu venkis Gary Kasparov kaj la tri ceteraj finiĝis sen venkanto. Unuafoje, komputilo venkis ŝak-turniron kontraŭ mond-ĉampiono.



Ŝakluda monda ĉampiono kontraŭ komputilo *Deep Blue*

En la jaro 1996, inter la 10a kaj la 17a de februaro, fine okazis turniro inter *Deep Blue* kaj Gary Kasparov. Entute okazis 6 matĉoj. La rusa ĉampiono venkis dufoje, aliaj du matĉoj finiĝis kun egalo kaj la komputilo venkis en unu el la matĉoj. Do, denove homo venkis maŝinon, tamen unuafoje komputilo venkis en unu el la matĉoj.

Post ĉi tiu nova venko de homo kontraŭ maŝino, IBM plibonigis sian softvaron, nova versio de *Deep Blue* jam kapablis kalkuli 200 milionojn da movoj en unu sekundo.

Tamen, Kasparov plendis okaze de unu el la matĉoj, tiam li metis dubon pri ebla homa partopreno okaze de decido de la komputilo. Okazis, ke en unu el la movoj dum matĉo, la homa ĉampiono movis pecon kiu povus esti kaptita de *Deep Blue*, tamen la komputilo, nelogike, rifuzis tiun kapton. Do, Kasparov demandis ĉu vere ludis sen ia homa interveno.

Laŭ la regularo de la turniro, informadikistoj de la softvaro de *Deep Blue* povis aktualigi se necese la programon, tamen tio neniel povus

okazi dum matĉo. La nelogika movo de *Deep Blue* pensigis, ke homa menso estis post la movoj de la komputilo ankaŭ dum la matĉo. Tiel, polemiko naskiĝis kaj aperis duboj pri la senhelpa partopreno de maŝino dum la turniro.

Unuamomente la kompanio IBM akceptis informi pri la informadikaj registroj de tiu matĉo kaj pri la kialoj de la movo de la komputilo, kiam ĝi rifuzis kapton de kontraŭa peco, tamen

fine IBM ne havigis tiujn registrojn, do, dubo pri ebla interveno de homa menso dum la matĉo kreskis

Kio okazis fine kun *Deep Blue*? Nu, la softvaro neniam denove estis uzata okaze de ŝaklud-turniro. La komputilo mem estis malmuntita, la rakoj (ujo kie estas muntita la tuta hardvaro) estis senditaj al Nacia Muzeo de Amerika Historio en Vaŝingtono kaj al la Historia Muzeo de Komputiloj en Kalifornio.





Flamenko

El Beni de Cádiz

Benito Rodríguez Rey naskiĝis en la urbo Kadizo en la jaro 1930, ĉe cigana familio. Jam infan-aĝe li forte inkliniĝis al ĉiusecaj artoj kaj ĉefe al flamenko. Tiel, nur 8-jaraĝa li estis kapabla distingi ĉiujn flamenkajn stilojn kaj eĉ kanti kelkajn el ili.

Jun-aĝe li decidis akompani la spektaklon de du grandaj flamenkaj kantistoj: Manolo Caracol kaj Lola Flores. Unuamomente li nur dancis en la spektaklo, tamen post konsilo de la majstro Caracol, li fine decidis ekkanti. Li alprenis la artan nomon *Beni de Cádiz*, tio okazis kiam li estis apenaŭ 17-jaraĝa.

Ĉe la flamenka spektaklo de Manolo Caracol, Beni de Cádiz diskonigis sin tra la tuta Hispanio, tiel en la jaro 1955, li ekigis sian propran spektaklon "*Pregón de Coplas*" kune kun la kantistino Lola Campos en fama teatro de Madrido. Dum la sekvantaj jaroj li kantis en la plej prestiĝaj teatroj de la hispana ĉefurbo kaj de la cetera Hispanio.

En la jaro 1962, li decidis ekigi turneon ekster Hispanio, tiel li montris



Benito Rodríguez Rey
"El Beni de Cádiz"

sian flamenkan spektaklon en Eŭropo kaj en Ameriko. Li eĉ partoprenis en la aktoj okazintaj ĉe la Hispana Pavilono de la Universala Ekspozicio de Nov-Jorko en la jaro 1964. Tie, li havis kiel publikon gravajn artistojn kaj politikistojn, kiel J.F. Kennedy, Martin Luther King, Ernest Hemingway, Pablo Picasso, Frank Sinatra kaj aliaj.

Komence de la 1970aj jaroj, li decidis akiri propran teatron en Seviljo,

ĉe la strato Canalejas, tie, de tempo al tempo, Beni de Cádiz kantis antaŭ sia publiko. Lia figuro kiel flamenka kantisto estis agnoskata, do, en la jaro 1971 li atingis premion okaze de la Nacia Konkurso pri Flamenka Arto de Kordovo.

Beni de Cádiz forpasis en la urbo Sevilo en la jaro 1992. Flamenkaj fakuloj asertis, ke li posedis unu el la plej belaj voĉoj de la flamenka arto, kun sennombraj sonampleksoj. Li kantis belege seguirijas kaj alegrioj. Same, li estis tre konata pro sia kapablo improvizi dum la kantado.

Alegrio kantita de Beni de Cádiz:

*Mia koro vivas en nigra obskuro,
mia strato helajn lampojn ne havas,
mia koro vivas en nigra obskuro,
sed via placo flamas pro via figuro.*

*Jam la permeso de Romo
estas aprobita,
mi amas mian knabinon
ekde naskita.*



Alegriojn de Beni de Cádiz oni povas aŭskulti ĉe Jutuba paĝo:
<https://www.youtube.com/watch?v=FValFpXr5xI>





Fervojista Angulo

Relo-busoj en Andaluzio

Relo-buso estas fervoja trajno kun dizela aŭ elektra motoro, kiu konsistas ĝenerale nur el unu vagono memmova. Do, ili estas kompareblaj al aŭtobusoj, kvankam ĉi tiu veturilo iras tra reloj. La ĉefa celo de relo-busoj estas komuniki urbojn kun ne tro distaj zonoj.

En Hispanio la unuaj relo-busoj ekfunkciis en Valencio en la 1950aj jaroj. En Andaluzio ili komencis esti uzataj en Seviljo en la jaro 1962. Entute alvenis 8 relo-busoj, kiuj estis konataj de la vojaĝantoj kiel "*oniskoj*" aŭ "*la avo*". Dum la 60aj kaj 70aj jaroj de la pasinta jarcento, la relo-busoj komunikis Seviljo kaj Kordovon;

Seviljo kaj Kadizoj aŭ Jerezon kaj El Puerto de Santa María, ĉi lasta fervojo estis konata kiel "*la trajno de la plaĝo*".

Vere, relo-busoj estis tre similaj al aŭtobusoj, ekzemple, la unuaj konstruitaj en Eŭropo uzis kiel bazan ĉasion, tiun de veraj aŭtobusoj. Krome, ili havis nur du aksojn kaj du radojn, tio estas kiel la aŭtomobiloj, la sola diferenco baziĝis sur la faktoj, ke radoj estis metalaj kaj ili iris sur reloj. Alie, la ŝoforo ne okupis izolitan kupeon, male li direktis la fervojon sur la antaŭa parto de la relo-buso, do, kiel aŭtobusoj.



Relo-buso, miksaĵo inter aŭtobuso kaj lokomotivo

Relo-busoj trairis Andaluzion dum du jardekoj, kiam ne ĉiuj familioj posedis propran aŭtomobilon por iri en la laborejon aŭ por turismi en marbordaj lokoj. Eble pro tio, kiam aŭtomobiloj ĝeneraliĝis, la celo de relo-busoj, tio estas faciligi la komunikadon inter proksimaj urboj aŭ labor-lokoj, jam ne havis sencon.

La lasta vojaĝo de relo-buso en Andaluzio okazis en la jaro 1984, tiam la lasta relo-buso eliris el la stacidomo de Jerezo por iri en El Puerto de Santa María, urbo nur je 18 kilometroj. Kvankam verdire, ili ne tute malaperis, simple ili estis anstataŭigitaj ĉu de tramoj, ĉu de pli modernaj periferiaj trajnoj, kvankam ĉi-lastaj jam kun pliaj vagonoj.



Relo-buso en la stacidomo de Sanlúcar de Barrameda (Kadizo) 1980aj jaroj.



Relo-buso en la stacidomo de Jerezo.


LA FOSILIO

Brila kosmoŝipo ĵus venis de fora stelo. Ĝi sputis sian internan fajron, kiu levis la pulvoron de tiu antikva planedo.

Kiam pulvoro fine fiksiĝis, malfermiĝis pordo, tiam ili eliris, kovritaj per skafandroj, unue la arkeologoj.



Poste aperis la maŝinoj kaj la ilaro, ĉio bezonata por ekigi esploradon.



Kaj la esplorado komenciĝis. Ili traboris la mortintan planeton. Ili uzis potencajn traborilojn kiuj trapasis tavolojn da lafo, unu post la alia.

Baldaŭ ili haltis. Maŝinoj silentiĝis. Arkeologoj trovis grandan fosilian oston.



Ja vere antikva !

Jes, ĉi tiu fosilio estas pli antikva ol nia planedo.

Ili esploris intense la eltrovon.

Ĉi tiu fosilio pravigas mian teorion. La vivo ne komenciĝis en nia planedo. La unuaj vivantaj entoj venis de aliaj galaksioj.

Jes! Ĝuste de ĉi tie!

Jen la femuro de granda estaĵo. Ĝi estas du-foje pli granda ol nia kosmoŝipo.

Kiam li vivis, nia planeto ankoraŭ ne ekzistis.

Daŭrigu la laboron, ni devas trovi la tutan skeleton.

Jes, ni devas rekonstrui ĝin komplete.



Iom post iom, traboriloj trovis pli kaj pli da ostoj. Baldaŭ la rekonstruado de la kompleta skeleto komenciĝis.

Aliaj membroj de la ekspedicio surpriziĝis pro la grandaj kaj gravaj eltrovoj.

Profesoro, kial tiom da bruo pro tiu eltrovo?

Kapitano, kiam la rekonstruado de la skeleto estos finita, ni estos antaŭ estaĵo kiu ekzistis eĉ antaŭ ol nia planedo.



La scivolemo de la kapitano
daŭris

Ĉu tio signifas,
ke tiu estaĵo jam
ekzistis kiam nia
planedo apenaŭ
estis gasoza globo?

Tutcerte!
Krome, nia
teorio aser-
tas ke la
vivo komen-
ciĝis ĝuste
ĉi tie.



Do, kiel la vivo
atingis nian
planedon?

Pro sporoj.
Verŝajne, post
granda geolo-
giaj ŝanĝoj, eble
lafo forĵetis vivajn
sporojn dise en la
spacon.



Tio signifas, ke vulkana kata-
klismo okazis antaŭ milionoj da
jaroj.



Kaj la arkeologo daŭris: *Sur la forĵetitaj rokoj troviĝis sporoj kiuj iam falis sur nian junan planedon, tiam ne-vivanta globo. Tiamaniere venis la vivo en nian planedon.*



Ili bezonis por ĝermi nur grundon, akvon kaj sunon...



Tiam la evolucio
ekis.

Tiuj unucelaj estaĵoj disvolvi-
ĝis la apero de multcelaj
organismoj, kaj jen ni !



La kapitano atente rigardis la vertebran kolumnon, kiun arkeologoj zorgeme rekonstruis.



Do, oni povus diri, ke ĉi tiu estaĵo estis nia praulo.

Jes, ĉi tiu estaĵo estis parto de la vivo de ĉi tiu planedo.

Kaj nia propra vivo ekis en ĉi tiu planedo, do ni estas multdistancaj posteuloj.

Ĉu la kataklismo de vi menciata estis la kaŭzo de la morto de ĉi tiu planedo?



Eble! La vivo ĉi tie vanuis kaj poste ĉio ekis sur nia planedo.

Profesoro, ĉu la tuta vivo de la galaksio ekis ĉi tie?

Eble ne, verŝajne ĉi tien venis ankaŭ foraj sporoj de alia planedo de fora galaksio. Ŝajnas, ke ĉio estas eterna rekomenco.

Kiel senĉesa kateno.



Jes, senĉese.

Ĉi tiu estaĵo estis enorma, ĉu ne?



Jes! Ni kalkulas, ke ĝi estis kiel dufoje nia kosmoŝipo.

Do, kion vi faros kiam la skeleto estos tute rekonstruita?



Ni decidis ĉirkaŭkovi ĝin per pecoj da ŝtofo. Tiam, ni komprenos kiel estis ekzakte kaj precize ĉi tiu estaĵo.

Mi deziras vidi ĝin tuj!

Ĉiutage aperis pliaj ostoj, kiuj estis metitaj en la grandan skeleton. Dumnokte, arkeologoj revenis en la kosmoŝipon. Iom post iom la skeleto aspektis pli kompleta.



Poste, la arkeologoj ĉirkaŭkovris la ostaron per grandaj pecoj da ŝtofo.

Ĉi tiu artefarita haŭto helpos nin kompreni kiel reale ĝi estis.

Jes! Tute certe haŭto kaj hararo kovris la ostojn.



Jen mirinda arkeologia trezoro. Multa sciencistoj de nia planedo venos ĉi tien por detale observi kaj esplori ĉi tiun estaĵon.

Ĝi estas enorma.



Fine, pecoj da ŝtofo ĉirkaŭkovris la tutan skeleton.

Profesoro, ĉu vi pensas ke li estis inteligenta?

Tute ne! Vidu, li marŝis kvarpiede.



Alie, li ne kapablis antaŭvidi la detruon de la planedo.

Ĉu vi pensas, ke ĝi iamaniere respondecis pri tiu detruo?



La kapitano kaj la arkeologo eniris en la kosmoŝipon.

Verŝajne ne, tamen mi ne scias kio ĝuste okazis

Ĉu ĉi tiu estaĵo kulpis pri tio?

Li ne estis inteligenta estaĵo, tamen aliaj kiel li eble respondecis pri la kataklismo.

Iam ni trovos spurojn de tiuj aliaj estaĵoj.

Ene de la kosmoŝipo ili demetis siajn skafandrojn.



Tiam videblis la posteuloj de tiuj sporoj falintaj sur tiun junan planedon.

La kosmoŝipo ekflugis survoje en sian planedon.

Estu preta!
Ni foriras.

Rigardu !


Jes, ankaŭ mi pensas ke ĝia vizaĝo volas esprimi ion perturbantan.



Tie restis la estaĵo, zorge kaj detale rekonstruita, ĝi, kvarpiede, sur sia mortinta mondo.

Lia vizaĝo!

Ŝajnas, ke ĝi ekploras!



FINO

nun ni

junularaj paĝoj



Si eres joven (-35 años) y deseas colaborar con el movimiento esperantista andaluz en un grupo específicamente para jóvenes, te informamos que puedes participar en el proyecto AJEU (Andaluzia Junulara Esperanto-Unuiĝo). Contacta con este grupo a través de la dirección electrónica: ajeu@esperanto.ac. Y no olvides hacer las propuestas que creas más interesantes para el movimiento esperantista juvenil en Andalucía.

Se vi estas juna (-35 jaraĝa) kaj vi deziras aliĝi al andaluzia E-asocio specife por gejunuloj, AJEU estas inda projekto por kunlabori. Kontakti kun ni pere de la adreso: ajeu@esperanto.ac Kaj ne forgesu proponi tion kion vi konsideras interesa por la andaluzia esperantista junularo.

Te pasamos ahora información sobre el próximo encuentro juvenil internacional esperantista que se celebrará en la ciudadana lituana de Šventoji del 18 al 25 de agosto de 2024.



Andaluzia Junulara Esperantisto-Unuiĝo - AJEU

La junularaj kongresoj okazas ĉiujare en malsama lando, la ĉefa celgrupo de partoprenantoj estas homoj de aĝoj inter 15 kaj 35 jaroj. Kutime venas ĉirkaŭ 200 homoj. Normale, ĉi tiuj renkontiĝoj havas klaran strukturon kaj eventojn. En ĉiu junulara kongreso okazas:

- Diskejo: ĉiu nokte oni dancas ĝis la mateno, oni aŭskultas muzikon de ĉiuj kontinentoj, oni ĝuas esperantan muzikon, oni dancas bambon ktp.



- Ekskurs(a) tago(j): ĉiu mekreko (kaj ankaŭ dum aliaj tagoj), oni povas partopreni en ekskursoj kaj koni la regionon, kie okazas la kongreso. Se oni ne iras al ekskursoj, oni povas ĝui la trankvilan tempon kaj dormi post dancado en la diskejo.

- Gufujo: se dumnokte oni ne deziras danci en la diskejo, oni povas trinki teon kaj trankvile babili en gufujo. La vorto *gufujo* esprimas tiun trankvilan, sen-alkoholan kaj sen-fuman renkontiĝon, kies ĉefa celo estas babili.

- Internacia vespero: jen ŝanco por montri naciajn kulturojn, tradiciajn kantojn aŭ dancojn, aŭ iam improviziitan teatraĵon. Internacia vespero estas plena je ĉio.

- Esperanta kongreso estas perfekta ŝanco makovri ion novan, kion vi antaŭe ne sciis. Dum kongreso vi povas aŭdi ĉion: de diskutoj pri lingvaj rajtoj ĝis prelegoj pri birdaj migradoj. Vi estas bonvena pretigi vian propran paroladon pri temo de vi regata.





Andaluza Kuirarto

Paŝtista Ajlo

Paŝtista ajlo estas saŭco aŭ kondimentado preparita de paŝtistoj en Andaluzio, ĉefe en la provinco Jaeno, dum la Mezepoko por gustigi viandon el ŝafo, kuniklo aŭ kokido.

Kiel ĉiuj antikvaj kondimentoj, ĝi estas plena el spicoj. Nuntempe, ĝi estas ankoraŭ uzata en kelkaj receptoj, ĉefe pro ties facileco, spica gusto kaj pro la ne-abundaj ingredientoj bezonataj.

Jen la ingrediencoj por du homoj:

- Terpomoj (500 gramoj).
- Oliv-oleo.
- Ajloj (5).
- Salo.
- Kumino (1 kulereto).
- Dolĉa ruĝa papriko (1 kulereto).
- Origano (1 kulereto).
- Vinagro (75 ml.)
- Blanka vino (75 ml.)
- Akvo

Kaj jen la preparado:

- 1) Sen-ŝeligu la terpomojn, tranĉu ilin laŭ egalaj pecoj.



Blanka vino



Dolĉa ruĝa papriko



Origano



Salo



Kumino



Vinagro



Terpomoj



Oliv-oleo



Akvo



Ajlo

2) Ene de pistujo, pistu la origanon, ajlojn, salon kaj dolĉan ruĝan paprikon. Post la muelado, verŝu blankan vinon kaj vinagron. Miksu ĉion.



4) Terpomoj kun ĉi tiu saŭco povas esti prezentitaj kiel telero mem aŭ kiel kondimento por ĉefa manĝaĵo, ĉefe viando.

3) Verŝu oliv-oleon en paton kaj ekfritetu iomete la terpomojn. Poste, aldonu la miksaĵon de la paŝo 2-a. Verŝu ankaŭ iomete da akvo. Kuiru ĉion milda-fajre, ĝis kiam terpomoj restos molaj.



¿Quiere conocer la historia del movimiento esperantista en Sevilla desde sus inicios hasta comienzos del siglo XXI?

Le recomendamos el libro **125 años de esperanto en Sevilla**, publicado por la editorial Círculo Rojo.

Precio de la obra: 15 €

Contacte con: cordoba14@esperanto.ac



Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio

La Rifo de la Sirenoj en Almerio

Rifo de la sirenoj estas kresto el rokoj, kies videbla eksteraĵo estas unu el la plej diskonigita bildo de la Natura Parko *Gata-Nijar Kabo* en la provinco Almerio. Temas pri ekologia formacio kun vulkana origino, ĝi troviĝas ĝuste ĉe la plej orienta punkto de la Ibera Duoninsulo. La nomo de la rifo "*de la sirenoj*" jam elvokas legendan devenon.

Tradicie, oni rakontas, ke humila fiŝkaptisto elektis tiun rifon kun blua akvo kaj abunda fiŝaro, por atingi nutraĵojn por sia familio. Antaŭe, li mem elektis tiun lokon por entombigi sian patrinon, pro la fakto, ke ĉe tiu ejo ekzistis paco kaj kvieteco.

Iam, kiel ĉiuj aliaj tagoj, la fiŝkaptistoj prenis sian kanon por ekigi novan tagon apud la maro. Ĉe la rifoj nur estis aŭdeblaj mar-ondoj, tiam, har-stariga krio rompis la matenan silenton. Tamen, nenio plia okazis, kaj post kelkaj horoj la fiŝkaptisto denove revenis hejmen.

Je la sekvanta tago, kiam li denove fiŝkaptis ĉe la rifo, li ree aŭskultis teruran krimon, kvankam tiu-foje li



Rifo de la Sirenoj,
ĉe la Gata-Nijar Kabo

kapablis diveni, ke la krio venis el la mar-fundo. Post kelkaj minutoj, stranga estaĵo eliris el la maro. Li povis vidi nur la voston, temis pri fiŝa vosto kun arĝentaj skvamoj. La fiŝkaptisto asertis, ke li povis vidi ankaŭ virinan figuron kun verda hararo, kiu lanĉis terurajn kriojn.

Rapide, li sciigis al ĉiuj pri tiu stranga apero, sed neniu kredis lin. Tamen, ekde tiam tiu loko estis konata kiel "la Rifo de la Sirenoj".

Estas necese diri, ke ĉiuj legendoj pri sirenoj iam rakontataj en tradicioj aŭ sur antikvaj libroj, verŝajne rilatas al fokoj. Tio mem povis okazis al ĉefrolulo de nia historio.

Certe, fokoj jam ne troviĝas en tiu rifo, sed antaŭ multaj jaroj, ja ekzistis kolonio de monaĥ-fokoj en la provinco Almerio, kaj nuntempe estas eble vidi ilin proksime, en la nordo de Afriko.

Kompreneble, monaĥ-fokoj ne similas al virino, tamen ili havas voston kaj el ili eliras terura krio. Do, ĉi tiu legendo povus havi kiel bazon certan vizion de fiŝkaptisto kaj ne necese halucionon.



Monaĥ-fokoj ĉe mediteranea plaĝo

Nuntempe, tio kio pli videblas en tiu rifo estas la pintaj siluetoj de rokoj, kiuj aperis post la kristaligo de vulkana magmo.



**Ĉu vi deziras esti ne nur leganto, sed ankaŭ kunlaboranto kun
GAZETO ANDALUZIA ?**

Niaj paĝoj estas malfermitaj al ĉiuj interesitoj, kaj ne nur rilate al la branĉoj jam ekzistantaj, sed ankaŭ al tiuj pri kiuj vi povus verki.

Do, jen via ŝanco ne nur por legi en esperanto, sed ankaŭ por redakti en la internacia lingvo. Se ĉi tiu propono interesas al vi, kontaktu kun la redakcio de la revuo pere de:

cordoba14@esperanto.ac



Krucvorto

	A	B	C	Ĉ	D	E	F	G
1								
2						■		
3							■	
4								
5				■	■			
6		■						
7				■			■	
8					■			

HORIZONTALE

1. Publika veturilo.
2. Animalido. ■ Sufikso signifanta unu el la konsistigaj elementoj de tutaĵo.
3. (*Inverse*) Kapabla sperti doloron kaj malfeliĉon kun trankvila senemociemo. ■ Sur la aŭtomobiloj de Aŭstrio.
4. (*Sen la lasta vokalo*) Arto helpi kaj plibonigi la memorkapablon.
5. (*Sen la lasta vokalo*) Subita malfeliĉo. ■ Malpeza kaj hela biero, fabrikata per malmulte rostita malto.
6. Sur la italaj aŭtomobiloj. ■ (*Inverse*) Fidela al la estro.
7. (*Sen la lasta vokalo*) Portebla loĝejo en kiu oni tenas vivajn birdojn aŭ malgrandajn bestetojn. ■ Sur la libanaj aŭtomobiloj. ■ Finaĵo de sustantivoj.
8. (*Inverse*) Disko, turniĝanta ĉirkaŭ akso. ■ (*Sen la lasta vokalo*) Karesformo de la fratino de mia patro.

VERTIKALE

- A. Aparato por apartigi substancon de ĝiaj malpuraĵoj aŭ de kunkomponaĵoj.
B. (*Inverse*) Partikulo, signifanta «plie», «krome». ■ Sufikso esprimanta daŭran agon faritan.
C. Havanta tri nivelojn.
Ĉ. (*Inverse*) Ŝanĝo de loko, pozicio aŭ stato. ■ Sur la aŭtomobiloj de Luksemburgio. ■ Vibranta konsonanto.
D. Alta leda piedvesto ■ Sufikso esprimanta kolekton de samspecaj ekzistaĵoj aŭ objektoj, formantaj unu tuton.
E. Verba finaĵo. ■ Gastropodo.
F. Subjunkcio, signifanta «en la okazo, kiam». ■ Instrumento. ■ Akuzativa finaĵo.
G. (*Plurale*) Respondo, plejofte dusenca aŭ neklara, kiun, en la nomo de sia diaĵo, la pastroj faris al tiuj, kiuj venis ĝin konsulti.



SOLVOJ AL LA KRUCVORTO DE LA PASINTA NUMERO

B	A	G	A	T	E	L	O
E	L	E	G	I	O	■	N
D	A	N	O	N	■	I	E
U	R	I	N	O	■	R	I
E	M	S	I	■	L	I	M
N	I	T	O	■	I	T	■
O	L	O	N	A	K	L	A
J	O	N	■	L	I	A	N

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Asociación Andaluza de Esperanto



Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio. Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi

La Asociación Andaluza de Esperanto es la organización que tiene como objetivo difundir la lengua internacional esperanto en Andalucía. Se fundó en el año 1984 gracias a la iniciativa de esperantistas de las provincias de Málaga, Sevilla y Córdoba. Hoy pertenecen y colaboran con AEU esperantistas de toda Andalucía y también de fuera de ella.

Estraro

Prezidanto / Presidente:
Vicepresidente / Viceprezidanto:
Sekretario / Secretario:
Kasisto / Cajero:
Voĉdonantoj / Vocales:

Directiva

Ángel Arquillos López
Fátima Jiménez García
José M^a Rodríguez Hernández
M^a Dolores Torres Mateo
Jordi Lietor López
Juan García del Río
Carlos Spinola
Alejandro Burgos Escalante
Juan Díaz Casado

Poŝta adreso / Dirección Postal: C/ Ánfora 6 5º D 29013 Málaga (Hispanio)
TTT-paĝo / Página web: www.esperanto.ac
Tvitero / Twitter: [@AndaluzioEO](https://twitter.com/AndaluzioEO)

[Aliaj adresoj de la E-movado / Otras direcciones del movimiento esperantista:](#)

Federación Española de Esperanto: www.esperanto.es
Asociación Universal de Esperanto: www.uea.org





**109-A UNIVERSALA
KONGRESO DE
ESPERANTO**

ARUŜO, TANZANIO, 3-10 AŬGUSTO 2024